

60-jaraĝa 60-voluma Scienca Revuo

Tiu ĉi 217-a SR-kajero komunikas al la fidelaj legantoj denove festend-an datrevenon pri ISAE kaj ĝia asocia organo: Scienca Revuo, kies unua eldono aperis la 15-an de marto 1949, festas sian 60-jaran ekzistadon per eldono de sia 60-a jarkolekto. La unua kajero de tiu ĉi fiera Vol. 60 estas enkondukita, en januaro 2009, per monografio: la aŭtoro, d-ro *Josef Kavka*, kiu mem festos la 25-an de aprilo sian 87-an naskiĝdatrevenon (Gratulon!) – publikigis ĝin kun la konscio de sia propra granda kontribuo al la prospero de nia asocia organo. Kun logika menso kaj klara intelekto, detala lingvokono kaj preciza laboro li servis kiel ĉefredaktoro de Scienca Revuo 10-jaran periodon (1978-1987) kaj ekde 2000 ĝis nun denove pluajn 11 jarojn per nelacigebla subteno de la eldonlaboro kiel kunredaktanto. Danko estu ankaŭ al s-ro *Rudi Hauger*, kiu en la posta 12-jarperiodo 1988-1999 redaktis Sciencan Revuon kaj zorgis pri ĝia vivteno, eĉ kiam li povis aperigi jen kaj jen pro financaj kaj personaraj krizoj, SR-kajeron nur po unufoje en jarkolekto.

Kun admiro kaj danko ni retrorigardu al la unuaj redaktantoj de nia asocia organo en multe pli malfacila tempo post la terura dua mondomilito, kiam ili ekaperigis ĝin en la jaro 1949 post rekonstruo de la Asocio kaj ties scienca organo. Ni rememoru la nomojn de d-roj *W.P. Roelofs*, *G.F. Makink* kaj *G. Hamming* por la 15-jara periodo 1949-1963, ĝis prof. *B. Popović* fariĝis ĉefa kaj respondeca redaktoro por la 14-jara periodo 1964-1977, dum kiu la eldono eĉ plialtiĝis okaze al po 6 kajeroj en jarkolekto.

Ekde mia respondeco pri la redaktado kun eldono de n-ro 181 (en Vol. 51, jaro 2000) ĝis nun estas regule eldonitaj 4 SR-kajeroj kun entute ĉirkaŭ 210-240 paĝoj en jarkolekto. Tion mi celas daŭrigi – sed mi povas fari tion nur kun la helpo de fidelaj ISAE-anoj, kiuj subtenas la financon eldonadon de la asocia organo, kaj kun la helpo de aŭtoroj, kiuj kontribuas per sciencaj artikoloj el siaj fakkampoj kaj aliaj sciad-sferoj. Bonvolu kompreni, ke ekde tiu ĉi jarkolekto la SR-kajeron ricevos – krom la aŭtoroj – la legantoj de Scienca Revuo nur post pago de la ISAE-membrotizoj. Mi provas – sed ankaŭ tion mi povas fari nur helpe de miaj fidelaj kunredaktantoj *Josef Kavka* kaj *Rob Moerbeek* – gardi la surpapere presitan regulan aperadon de nia Revuo, kiu garantias – kontraŭe al ofte sen lingvodisciplino en la reton ĵetitaj tekstoj – lingvajan kontrolon de la kontribuoj fare de lingvaj spertuloj. Tian kontrolon Esperanto bezonas kaj bezonos survoje al akceptita kaj perfekta Internacia Lingvo por tutmonda interkompreniĝo.

Distran kaj mens-riĉigan legadon deziras *Rüdiger Sachs*, prezidanto de ISAE

“Se vi ne krias, vi mortos neatenate“
(Mbabano, Svazilando)

Interna ideo, homaj rajtoj kaj ekologia perspektivo*

Wolfgang GÜNTHER

“La naturo imitas sin mem.
Grajno, ĵetita en bonan grundon, naskos frukton.
Principo, ĵetita en bonan menson, naskos frukton.
Ĉio estas kreata kaj kondukata de la sama mastro
– la radiko, la branĉo, la fruktoj, la principoj, la konsekvencoj.“
(Pascal)

Resumo

En la teksto estas prezentata la interna ideo de esperantismo en la origina formo el la tempo de Zamenhofo kaj laŭ la pli posta evoluo forme de la konceptoj de la Universala Deklaracio de la Homaj Rajtoj kaj de la pli aktualaj evoluoj en la kampo de mondvastaj solvoj pri la problemoj koncerne la krizojn de justeco kaj medio. La nova paradigmo-koncepto-“rajto“ de daŭropoveco kadre de daŭropova evoluiĝo, antaŭenirigata de la UN kaj la civilsocio, estas prezentata kiel imanenta identigilo de Esperanto mem kaj de racia plivastiĝo de la interna ideo. Estas starigita la postulo pri ĉi-rilata novorientiĝo de la esperantismo kaj ĝiaj oficialaj instancoj kadre de la Movado. La lingvo internacia mem estas nur unu aspekto de Esperanto, ĝia funkcio kiel daŭropove taŭga ekologia komunikilo estas absolute samgrava. La akceptemo fare de la cetera mondo koncerne Esperanton decide dependos de la akcepto de tiu ĉi ekologia identeco flanke de la Esperanto-movado.

* Prelego okaze de la 16-a Esperanto-Semajno de la Kulturo kaj Turismo en *Salou, Tarragona*, Hispanujo, 4-a ĝis 11-a de oktobro 2008.

Pri kio temas? Enkonduka superrigardo

La mondo ene kaj ekstere de la esperantismo kaj ties movado ofte miras pri la nesukceso de neŭtrala internacia lingvo. Por ekologie konsciaj kaj informitaj samideanoj tio ne estas surprizo...

Nia tutmondiĝa planedo detruige evoluadas laŭ la t.n. neo-liberalisma doktrino. Kadre de ĝi la antagonismo inter la mediokrizo kaj la justecokrizo imanente restas nesuperebla. Pro la limigiteco de nia planedo eĉ sociale rafinita formo de ĉi tiu doktrino porvive ne efikas kaj elmigro al Marso ne estas reala opcio. Por egaligi la vivostilon de la tuta homaro je la nivelo de la t.n. evoluintaj landoj necesas 4 ĝis 5 terplanedoj. La nuntempaj konsekvencoj de tiu ĉi dilemo estas unuflanke altiĝaj eksceso kaj aliflanke pliiĝaj mankoj. La riĉuloj kaj potenculoj same kiel la malriĉuloj, mizeruloj kaj senpotenculoj havas aliajn prioritatojn ol engaĝiĝi pri afero kiel neŭtrala lingvo, kiu endanĝerigas aŭ la dominajn rolojn de la unuaj aŭ la pure porekzistajn fortojn de la aliaj. En adopto de neŭtrala lingvo la riĉuloj sentas minacon kaj la mizeruloj ne vidas avantaĝon.

La nure lingva bazo de Esperanto evidente ne sufiĉas por decide konvinki la kapitaldepende tutiĝan, medie kaj kulture ekstermiĝantan homsocion. Eĉ se ne ekzistas vere aktiva batalo kontraŭ Esperanto, nesciado, nekonsciado, ignorado kaj neglektado sufiĉe obstaklas.

Kion do fari? Ĉu eblas identigi Esperanton propratrajte kaj sufiĉe amplekse por plitaŭgigi ĝin por la estonto de nia planedo? La jaro 2008 estis la jaro kaj de la planedo Tero kaj de la lingvoj (krom tio ankaŭ de la terpomo kaj de la baza sanitara prizorgado). Ni do provu respondon!

Jam Zamenhofo sentis la dilemon. Pro tio li kreis kaj la esperantismon kaj la homaranismon. La esperantismo reduktas sin eksklude al la lingva taŭgeco kaj aplikado-disvastigado de Esperanto en la intergenta, internacia kaj interkultura kampoj. La homaranismo aldonis al tiu lingva intereco la idealojn de frateco, justeco kaj paco inter la diversdevenaj homoj kiel anoj de unu homaro. Tiu ĉi koncepto nomiĝas “la interna ideo”.

Dum la duona jarcento poste la nocioj “frateco”, “justeco” kaj “paco” kelkloke ŝanĝiĝis al tiu de “solidareco” kaj fine oni formulis la “Universalan Deklaracion de la Homaj Rajtoj”, kiuj – laŭ opinio de multaj esperantistoj – nuntempe estas la ĝusta anstataŭaĵo por la “in-

terna ideo“. En ambaŭ idearoj, la “interna ideo“ de Zamenhofo de la komenciĝanta 20-a jarcento kaj la “Universala Deklaracio pri la Homaj Rajtoj“, proklamita de Unuiĝintaj Nacioj en la jaro 1948, la homo centriĝas kiel egalrajtigita estaĵo.

Hodiaŭ, duon-jarcenton poste, la homaro pli kaj pli konsciadas pri la finiteco aŭ limigiteco de sia planedo, ties resursoj kaj eltenpovo. Scio kaj konscieco pliiĝe kreis konscion, ke ne la homo kun sia kulturo, sed la biosfero kaj ties integro estas la fina rilatpunto de ĉio viva, do ankaŭ de la homara kunvivado. La koncepto de “daŭropov(ec)o“ (angle *sustainability*, germane *Nachhaltigkeit*, hispane *sostenibilidad*) kadre de “ekologia justeco“ nun montriĝadas kiel decida alfutura gvidilo.

Ni ĉiuj havas nur tiun ĉi unu planedon. Kaj la sukceso de Esperanto decide dependas de nova “ekologia interna ideo“, kiu komprenigas Esperanton kiel taŭgan parton de imanente ekologia komunikado, t.e. de imanente daŭropova komunikado. Tion ĝi faras kontraste al la angla lingvo, kiu prezentiĝas ĉefe kiel la lingvo de superrega, detruema kaj etik-morale homcentra mondkoncepto.

Do, la evoluo, kiu tuŝas nin kiel samideanojn, estas tiu ekde la origina “interna ideo“ tra la Homaj Rajtoj al ĉi tiu nova ekologia identeco kaj perspektivo. Ĉi-sekve jen detaloj.

La “interna ideo“ kiel tuto

Ĝenerale la nocio “interna ideo“ kompreniĝas kiel “plej supera celo“, “direktivo“ aŭ “gvidprincipo“. Ĝi premisas, ke ekzistas ekstera formo. Okaze de la neŭtrala internacia lingvo Esperanto la ekstera formo nomiĝas “esperantismo“. En la Deklaro de Bulonjo-ĉe-Marso (t.e. la loko de la 1-a Kongreso de Esperanto, 1905) la esenco de la esperantismo estis difinita kiel “la penado disvastigi en la tuta mondo la uzadon de lingvo neŭtrale homa, kiu, ne entrudante sin en la internan vivon de la popoloj kaj neniom celante elpuŝi la ekzistantajn lingvojn naciajn, donus al la homoj de malsamaj nacioj la eblon interkompreniĝadi inter si...” kaj “...kiu povus servi kiel paciga lingvo...” “...Ĉiu alia ideo aŭ espero, kiun tiu aŭ alia esperantisto ligas kun la esperantismo, estas lia afero, por kiu la esperantismo ne respondas.“ Mallonge dirite: “Estas esperantisto ĉiu, kiu scipovas kaj uzas Esperanton, negrave kiucele.“

Tiu ĉi difino reduktas Esperanton al ĝiaj teĥnikaj, praktikaj povoj kaj utileco kadre de la internacia komunikado. Ĝia identeco sin limigas je sia ekstera formo kaj valoro kiel taŭga lingvilo tia.

Laŭ historisciencaj esploroj Zamenhofo pro siaj propraj spiritaj idealoj kaj religiaj konvinkoj kaj pro la siatempaj intergentaj perturboj evoluigis idean bazon de Esperanto, kiun oni nomas “la interna ideo“. En la 3-a Kongreso de Esperanto en Ĝenevo, 1906, li eksplacite parolis pri la “interna ideo, entenata en la esperantismo“. La esperantistojn instigas al agado “ne la penso pri praktika utileco, sed nur la penso pri ... **frateco** kaj **justeco** inter ĉiuj popoloj“, li eldiris kaj formulis sian faman frazon “Kun tia Esperanto, kiu devas servi ekskluzive al celoj de komerco kaj praktika utileco, ni volas havi nenion komunan!“

En la Kambriĝa Kongreso, 1907, Zamenhofo uzis la vortojn “Ni deziras krei neŭtralan fundamenton, sur kiu la diversaj homaj gentoj povus **paco** kaj **frate** interkomunikiĝadi...“ kaj jam en la Bulonja Parolado li aludis ankaŭ la nocion “**egaleco**“ kaj dum la Ĝeneva Kongreso tiujn de “**libereco**“ kaj “**rajtoj de homo**“, kiam li rakontis pri la terura situacio en sia lando.

Paralele al siaj agadoj rilate la internan ideon de esperantismo Zamenhofo evoluigis la projekton de Homaranismo, unue intencita por forigi la diskriminacion kontraŭ la judoj, en interreligian idearon “sur fundamento neŭtrale homa, sur principoj de reciproka **frateco**, **egaleco** kaj **justeco**“. Oni facile malkovras la similecon inter ambaŭ ideoj.

Estas du aspektoj, kiuj gravas en la koncepto de la “interna ideo“:

1-e. Esperantismo estas ne nur lingva movado laŭ la ekstera formo de sia lingvo, sed havas ankaŭ apartan identojn, celojn, gvidprincipojn, nome tiujn de frateco, egaleco, justeco kaj paco.

2-e. Neŭtraleco ne estas granda absoluta, kiu kvazaŭ aŭtomate metas Esperanton eksteren de la mondo de diskuteblaj-disputeblaj eksterlingvaj valoroj kaj problemoj, same gravaj kaj interesaj por ĉiuj popoloj.

Moderne ni diras, ke la esperantismo ĝuste pro sia intergenteco havas interfacojn kun universalaj idealoj. Ĉi-rilate la interna ideo estis (kaj estas) minimuma etika interkonsentaĵo de la esperantistoj. Ĝi donas al la esperantismo tiun superan universalan identecon kaj celon, kiu principe sendependigas la individuan esperantiston kaj la

kolektivon de la esperantistaro disde apartaj ideologioj, kaj partoprenigas la tutan homon en la proceso de interkultura komunikado.

Resume, Zamenhofo mem karakterizis la internan ideon (antaŭ la 8-a Kongreso de Esperanto en Krakovo, 1912): “La interna ideo de Esperanto, kiu havas absolute nenian devigon por ĉiu esperantisto aparta, sed kiu, kiel vi scias, plene regas kaj ĉiam devas regi en la Esperantaj kongresoj, estas: Sur neŭtrala lingva fundamento forigi la murojn inter la gentoj kaj alkiutimigadi la homojn, ke ĉiu el ili vidu en sia proksimulo nur **homon kaj fraton**.“

Oni foje kontraŭstarigis tiun ĉi idean bazon forme de la interna ideo kiel specon de ideologio kontraste al la praktika internaciismo de lingva komunikado per neŭtrala lingvilo. Zamenhofo mem sentis tiun ĉi dilemon kaj transprenis en la internan ideon nur tion el la homaranismo, kio estis vere universala. Restis do la normoj de **frateco kaj justeco** kaj kiel ties sekvo, la **paco**.

La posta kultura kaj politika evoluo pravigis la koncepton de la interna ideo. Ja la Universala Deklaracio pri la Homaj Rajtoj estas eksplacite konsiderata kiel “la komuna idealo atingenda de ĉiuj popoloj kaj nacioj“. En la preamblo estas agnoskataj “la denaska digno kaj la **egalaj** kaj necedeblaj rajtoj de ĉiuj anoj de la homa komunumo kiel bazo de **libereco, justeco kaj paco**“ (grasliterado de la aŭtoro).

En la Artikolo 1 estas postulata “la interrenkontiĝado“ de ĉiuj libraj, egal-dignaj kaj egal-rajtaj homoj en la spirito de **frateco**. Oni vidas, ke ĝuste la kriterioj de la interna ideo estas ankaŭ tiuj de ĉi tiu fundamenta deklaracio. Aldone la Universala Esperanto-Asocio, kiu estis fondita antaŭ nun cent jaroj kiel “precipe socia, konstrua kaj progresema“ (laŭ *Hector Hodler*, la fondinto de UEA), iom dislimigante sin kontraŭ la apoguloj de la interna ideo, akceptis en la jaro 1980 per granda maĵorito novan statuton, en kiu la Homaj Rajtoj laŭ la Universala Deklaracio estas esencaj kondiĉoj por ĝia laboro. Racie oni do povas konkludi, ke, same kiel la Homrajta Deklaracio laŭ juro de kutimo intertempe fariĝis centra etik-moral-jura rilatpunkto de la homaro, la origina interna ideo nun kiel iam estas la centra ideala pivoto de la organizita esperantismo. “La Homaj Rajtoj (same kiel tiuj de la interna ideo) ne estas disponeblaj pro iu ideo de “neŭtraleco“: ili mem estas neŭtralaj, t.e. neideologiaj. La diskuto pri la troa eŭrop- aŭ okcident-centrismo de la Universala Deklaracio aŭ la streĉo-malharmonio inter la Homaj Rajtoj kaj kulturspecifaj valoroj ja teorie ekzistas, sed lastainstance nek science nek praktike

tion efikas, ke oni serioze ilin malakceptas. La universaleco de la Homaj Rajtoj ĉefe devenas de la reala kaj propra spertado pri suferoj en ĉiuj partoj de nia mondo.

Konstateblas do por ni esperantistoj, ke estos du neŭtralaj minimumoj por la tuta homaro:

1-e. La etik-morala minimumo, t.e. la Homaj Rajtoj, kaj

2-e. La lingva-komunikada minimumo, t.e. Esperanto kiel pura lingvo – ambaŭ certagrade kaj laŭ interkonsentiĝo pliampleksigeblaj, plibonigeblaj, ŝanĝeblaj.

La idealoj de la “interna ideo“ detale, tiam kaj nun

“**Frateco**“, hodiaŭ kelkfoje “**gefrateco**“, estas primare multreligie fiksita normo. Zamenhofo estis judo. Laŭ la Malnova Testamento frateco estas 1-e la pasiva sindeturnado de, ja eĉ rezignado pri malamo, kaj 2-e la aktiva plenumado de la kunhomeco en la senco de helpo al ĉiuj, eĉ kaj aparte al la malamiko. Ambaŭ aspektoj ekzistas ankaŭ en la Nova Testamento. Frateco kaj justeco estas la decidaj kriterioj en la amo al la proksimumo. Grava aspekto de la frateco estas la toleremo, kiu **kune kun** la vero, t.e. de la objektiva faktaro, kriterias en la individuaj kaj kolektivaj homaj interrilatoj. **Frateco akordigas liberecon kaj egalecon.**

En la Universala Deklaracio de la Homaj Rajtoj ĝi estas postulata en la unua Artikolo.

Por iomete diferencigi fratecon disde justeco oni kelkfoje uzas du frazojn el la Biblio, kiuj estas la du flankoj de la t.n. “Ora Regulo“. Laŭ tio “frateco“ estas pozitive esprimita kiel solidareco de agado: “**Faru** al aliaj kion vi volas, ke aliaj faru al vi!“ Kontraste al tio dislimiĝas la justeco, negative esprimita kiel solidareco de preterlasado: “**Ne faru** al aliaj kion vi **ne** volas, ke oni ĝin faru al vi!“ Frateco estas do pli spontana aktiveco, bazante sin sur spirita sinteno. Justeco pli multe dependas kiel leĝe fiksita regularo. Efektive Zamenhofo en sia interreligia koncepto de “Hilelismo“ (formo de Homaranismo, kiu por li estis la esenco de lia vivo) same prezentis la du versiojn de la Ora Regulo. La kerno de tiu ĉi doktrino intime rilatas al la bazaj Homaj Rajtoj: “Hilelismo estas instruo, kiu, ne deŝirante la homon de lia natura patrujo, nek de lia lingvo, nek de lia religio, donas al li la eblon eviti ĉian malverecon kaj kontraŭparolojn en liaj nacireligiaj principoj, kaj komunikiĝado kun homoj de ĉiuj lingvoj kaj religioj

sur fundamento neŭtrale homa, sur principoj de reciproka rajteco, egaleco kaj justeco.“ Tiu ĉi neŭtrale homa karaktero de la tri principoj estas nenio alia ol tio, kio restis en la “senreligiigita“ “interna ideo“ (ambaŭ estis aperigataj en la jaro 1906) kaj kiuj nuntempe funkcias kiel supera identeco de ĉiuj homoj laŭ la Universala Deklaracio de la Homaj Rajtoj.

La Supera Urbestro de Aŭgsburgo/Germanio resumis en sia parolado okaze de la “semajno de frateco“ en la jaro 2004: “Ĉiam denove valoras pripensi la ligitecon inter demokratio kaj frateco. Libereco kaj egaleco estas postuloj, pri kiuj oni batalis kaj plubatalas hodiaŭ. Sed frateco ne estas submetata al konkurso aŭ al batalo pri rajtoj. Per ĝi oni ne prezentas pretendojn, ne efektivigas postulojn aŭ ĝishavigas rajtojn. Ĝi estas ankaŭ sendependa de demokratiaj majoriaj decidoj, kiuj ne ĉiam povas estigi justecon por la unuopulo. Ĝuste tie, kie povoj kaj ŝancoj estas maljuste distribuitaj, frateco fariĝas la esenca kaj por la komunumo necesa parto de la demokratia konscio.“

La dua grava nocio kuntekste de la “interna ideo“ estas la (**intergenta justeco**). Endas deveni de la fakto, ke nepra antaŭkondiĉo de la interidea “intergenta justeco“ estas la “**egaleco**“ kiel natura, nelezbla kaj necedebla havaĵo de ĉiuj homoj (laŭ ekz. la Deklaracio de Sendependeco de Usono). Ĝi rezultigas la justecon kiel samkvalitan “rajton“, same enŝtata kiel interŝtata, same rilata al spirit-kulturaj kaj material-konkretaj socialaj aferoj. Hodiaŭ ni distingas inter “justeco“ kiel honesteco (angle: *fairness*), “justeco“ kiel egaldistribuado kaj “justeco“ kiel homa digno. La interna ideo verŝajne celis miksaĵon de la tri.

Ĉiokaze estas evidente, ke la teruraj regionaj kaj superregionaj konfliktoj tiam kaj poste havis ankaŭ sian kialon en ĝis tiutempe nedevige instalitaj interkonsentitaj normoj pri justeco. Diskriminacioj, persekutoj kaj subpremoj estis la sekvo, fakte regis “la leĝo de la pli-fortulo“: potenco senkonsciencie decidis. La intergenta lingva justeco fakte estis nur unu el la pluraj justecaspektoj – aspekto, kiu fakte nur en la lastaj jardekoj grave evoluis. Nuntempe la problemoj de “lingva justeco“ aŭ de “demokratia lingveco“ estas parto de justa mondordo.

Pri la nocio “paco“

Apud tiuj de “libereco“ kaj “justeco“ la nocio de “paco“ aperas en la unua frazo de la Universala Deklaracio de la Homaj Rajtoj. Laŭ tiu

ĝi necesigas kiel bazon la agnoskon de la esenca digno kaj de la ne-fordoneblaj rajtoj de ĉiuj membroj de la homa familio.

La nuntempa paco- kaj konflikto-esplorado difinas pacon duforme:

1-e kiel **negativan** pacon: ĝi signifas la foreston de milito kaj la konflikto-solvadon laŭ kaj per jure fiksitaj normoj, sen perfortoj; kaj

2-e kiel **pozitivan** pacon: ĝi signifas la foreston de strukturaj, kulturaj kaj nerektaj perfortoj, inklude la foreston de ekspluatataj strukturoj, ĝi signifas liberecon je timo kaj mizero.

Certe jam Zamenhofo kategoriigis ĉi-tiele. Esperanto laŭ li ne konsideremas naciecon, religion, lingvon aŭ kulturon, sed la samhomon de ĉiuj, plej grave aludanta en la aktuala frazo: “Ni ĉiuj estas homoj kun nia unu vivo sur nia unu planedo: homoj, kiuj volas vivi meze de vivo, kiu volas vivi.” Zamenhofo komprenis pacon ne sole kiel pasivan staton, sed kiel aktivan penadon: Esperanto por li ne nur estas paca, sed paciga lingvo kaj li komprenis Esperanton kiel “la neŭtralan fundamenton, sur kiu la diversaj homaj gentoj povas pace kaj frate interkomunikiĝadi”. Por la unua Esperanto-Kongreso, Zamenhofo kreis poemon, en kiu lastastrofe tekstas: “Unuiĝu la fratoj, plektiĝu la manoj, antaŭen kun pacaj armiloj! Kristanoj, hebreoj aŭ mahometanoj, ni ĉiuj de Di’ estas filoj. Ni ĉiam memoru pri bon’ de l’ homaro, kaj malgraŭ malhelpoj, sen halto kaj staro, al frata la celo ni iru obstine, antaŭen senfine”.

Tiu ĉi vigla sinteno koncerne pacon kongruas kun tiu de multaj pacaktivistoj en la posta historio: “Paco estas, kiam vi ĝin havas. Vi povas havigi ĝin nur, se vi ĝin donas.” Niatage la german-palestina verkisto *Anis Hamadeh* en sia eseo “Kio estas paco?” resumis jene: “Ĉi tiu demando fine celas la konsciiĝon pri la fakto, ke paco estas io, kion ni unue devas krei. Io, kion ni mem devas el-songiĝi denove en ĉiu konkreta situacio”.

Pli facile estas tio en la mond- kaj ŝtatpolitikoj. Se tie paco unuavice estas komprenata kiel “nemortigado” kaj dualinie kiel “neperfortado” je konsideremo de struktura kaj kultura perfortoj, tio sufiĉas por fari el la mondo belan lokon. Tiele la paco duone estas la foresto de devigoj kaj de bildoj pri devigoj, kaj duone la malplena spaco de aperta situacio, kiu devas esti plenigata individue kaj kreive por ricevi sian signifon, simile kiel ĉe la libereco, kies unu duono estas pasiva, t.e. **libera de** kaj kies alia duono estas aktiva, t.e. **libera al** la pliampleksigo de la “interna ideo” per la koncepto de daŭropoveco.

Esperanto kiel ekologia komunikilo

La principe jam de kelkaj jarcentoj daŭranta tutmondiĝo, t.e. la pliigita interplektado kaj interdependigo de nia mondo surbaze de ĉefe kapitaldependaj kaj profit-orientataj strukturoj, atingis decidan turnopunkton en la mezo de la 70-aj jaroj de la lasta jarcento. Ekde tiam la homaro – t.e. la kulturo – foruzas pli da resursoj el la naturo ol ili povas esti regenerataj. Entute oni kalkulas, ke nuntempe la troekspluatado pri resursoj kaj la troŝarĝado per porvive toksaj substancoj estas ĉirkaŭ 40 ĝis 50 procentoj. Tio signifas, ke la homaro konstante eniras epokon de altiĝantaj mankoj kaj venenadoj. Oni nomas tion la “ekologia krizo” aŭ “mediokrizo”.

La vorto “ekologia” ĉi-kuntekste rilatas al la politike neŭtrala nocio de la interdisciplina gvidscienco ekologio, kiu priskribas la normojn de la strukturo kaj dinamiko en la rilatoj de ĉio viva inter si kaj al la neviva ĉirkaŭo.

Ni ja bone scias, ke la ekologia krizo plifortiĝas, transe de ĉiuj politikaj sistemoj, sed certe homfarite, ĉiu el ni partoprenas en tio. Kaj certe komunikado ege gravas. La aktuale disponeblaj firmaj donitaĵoj unusignife konfirmas plirapidiĝantan malboniĝadon de la biosfero kaj elĉerpiĝadon de la Planedaj resursoj – tiel, ke oni jam parolas pri la forpaso de la futuro. Se la tuta homaro vivus laŭ la ĝisnuna vivnivelo de Eŭropo kaj la norda Ameriko, estus bezonataj 4 ĝis 5 terplanedoj. La finiteco de nia planedo Tero kaj ties biosfero estas la ĉefa ekkono kaj konsciiĝaĵo de la lastaj 30 jaroj.

Samtempe kaj similgrade kiel tiu ĉi mediokrizo estiĝis la t.n. “just-ecokrizo”. Ekzemplodone gravaj rekonsiloj estas kvar faktoj:

1-e: Nuntempe ĉirkaŭ 20 % de la mondloĝantaro konsumas ĉirkaŭ 80%-n de ĉiuj varoj;

2-e: la laborenspezoj de 20 % de la homoj en la plej riĉaj landoj estas 82-oble pli altaj ol tiuj de 20 % en la plej malriĉaj landoj;

3-e: en la jaro 2001 la malneta naciprodukto de la 48 plej malriĉaj ŝtatoj de la mondo estis malpli granda ol la kombinitaj riĉaĵoj de la 3 plej riĉaj personoj de la mondo;

4-e: sude de Saharo estas malpli da telefoninstalaĵoj ol en Manhatano, Usono, k.t.p., k.t.p.

La dilemo estas evidenta. La mediokrizo pliakriĝas, se la vivnivelo de la evoluantaj landoj direktiĝas al la nivelo de la evoluintaj

landoj kaj la justecokrizo plialtiĝas, se la medioprotektado en la evoluantaj landoj direktiĝas al la nivelo en la evoluintaj landoj aŭ eĉ pli laŭ la postuloj, kiuj garantias halton de la mediodetruado. Simple veras, ke aktuale la justeckrizo estas la kaŭzo de la mediokrizo. Dum la resurso-ekspluatado de la evoluantaj landoj pro la politike absolute nesufiĉe regata “neo-liberalismo“ de la evoluintaj landoj daŭras, la mediokrizo kaj la justeckrizo akregiĝas.

Por solvi tiun ĉi mortigan problemon estis investitaj dum la pasintaj 20 jaroj multaj fortostreĉaj klopodoj en ĉiuj partoj de la mondo kaj flanke de Unuiĝintaj Nacioj, regionaj ŝtat-aliancoj kaj neregistaraj organizaĵoj de la t.n. civilsocio, ekde la *Brundtland*-raporto en 1987 tra la grava Monda Pintkonferenco en Rio-de-Ĵaneiro 1992 kun sia decida “Agendo 21“ ĝis la multaj postaj konferencoj en Kioto, Johanesburgo, Balio k.t.p., kaj fine la “Jarmila Deklaracio (pri Evoluigaj Celoj) de UN (2000). La nova pivota kriterio kaj gvidlinio por la futura disvolvigo de la tutmondiĝa homa socio fariĝis la “daŭropoveco“ forme de “daŭropova evoluigo“.

La nocio “daŭropoveco“ konsistas laŭ Vikipedio el 3 komponantoj, kiel tute nomita ankaŭ “la 3-kolumna modelo de daŭropoveco“:

1-e: La **ekologia daŭropoveco** priskribas la celodimension konservadi la naturon kaj medion por la postaj generacioj. Tio kompreneble ampleksas la konservadon de la speciodiverseco, la klimatoprotektadon, la flegadon de kulturpejzaĝoj en iliaj originaj formoj same kiel zorgeman traktadon de la natura medio;

2-e: la **ekonomia daŭropoveco** starigas la postulaton, ke ekonomiaj aktivadoj aranĝendas tiel, ke ili daŭre prezentu taŭgan bazon por akirado kaj bonstato. Aparte signifa estas tie ĉi la protektado de ekonomiaj resursoj kontraŭ ekspluatado.

3-e: la **socia daŭropoveco** komprenas la evoluon-evoluigon de la socio kiel vojon, kiu ebligas partoprenadon de ĉiuj membroj de ajna homa komunumo. Tio ampleksas ekvilibrigon de sociaj fortoj kun la celo atingi daŭre futuroebligan, vivindan socion.

Imanenta en tiu ĉi koncepto de daŭropoveco estas la – el la medicino konata – principo de “preventado“ (“preventivo“), kiu signifas dekomenca evitadon de riskaj kaj/aŭ damaĝaj alpaŝoj kaj aktivadoj.

Por kompreni la esencon de “daŭropoveco“ estas utile noti, kion ĝi origine signifis en la kampo de forstado, nome “homcele forpreni ne pli multe da arboj el la arbaro ol kiom el ĝi povas esti regenerata.“

Evoluigo estas daŭropova, se ĝi estas 1-e daŭre adekvata al la necesoj-bezonoj de ĉiuj el la nuna kaj posta generacioj, kaj 2-e daŭre eltenebla por la ekosistemo. Tio postulas, ke sociaj, ekonomiaj kaj ekologiaj celoj rigardendas egalgravaj. Ekologie kialigeblaj pretendoj devas priatenti ties ekonomiajn kaj sociajn efikojn. Sed same la ekonomio mezurendas laŭ sia ekologia akordiĝemo. Evoluigo, kiu endanĝerigas la naturajn vivobazojn kaj ne adekvatas al la postulato de daŭropoveco, ne plu eblu. Responso realigado de daŭropova evoluigo pretendas la integradon de mediopolitikaj interesoj en ĉiuj politikaj kaj kulturaj kampoj laŭ 3 strategioj:

1-e: La strategio de **efikeco**, t.s. atingi laŭeble plej altan utilon per laŭeble plej malalta investo de resursoj (t.e. alta inteligento + malalta enmeto = daŭropova evoluigo), strategio, kiu bone estas konata el la ekonomio;

2-e: La strategio de **konformeco**, kiu celas la akordigeblon inter ekologio kaj ekonomio, t.s. prioritatan konsideremon de la disponebloj pri kaj de la eltenpovoj en ekosistemoj. Ĉefe tie ĉi validas la principo de “preventado“, ankaŭ en la formo de “En okazo de dubo: Ne!“

3-e: La strategio de **sufiĉeco**, kiu celas la principojn de modereco kaj kontentiĝemo en individuoj kaj kolektivoj per retaksado de la troa kaj bio-detrua vivostilo en la industrinacioj kaj per mondvasta pli justa distribuado de materiaj havaĵoj kaj politikaj partoprenoj.

Ĉe la koncepto pri daŭropova evoluigo decidiĝas la demando, ĉu la homaro kapablas respondi al la postulato pri justeco en la mondo kaj samtempe respekti la finitecon-limigitecon de la biosfero. La bonstat-modelo de la riĉaj landoj ne estas justecopova kaj la deziro pri justeco estas legitima nur, se ĝi celas resursoŝpareman kaj biosferokonforman, do daŭropovan bonstaton. Lastinstance ĉio ĉi signifas, ke la reduktado de malriĉeco kaj mizero en la mondo antaŭkondiĉas la reduktadon de riĉeco kaj superflu-konsumon.

Tree notindas, ke laŭ vidpunkto kristanisma la pensado pri daŭropoveco profunde rilatas al la Biblia ordono el Genezo 2, verso 15 “kulturi-kultivi kaj konservadi la Teron“.

Kiel daŭropoveco kaj “daŭropova evoluigo“ rilatas al Esperanto kaj ties “interna ideo“?

Jen la ideoĉeno:

1. La interna ideo de esperantismo laŭ Zamenhofo estas la aplikado de la idealoj-konceptoj de la Franca Revolucio (frateco, egaleco, libereco) kaj de tiu de paco al la komunikado per la Internacia Lingvo.

2. La esencoj de la interna ideo post Zamenhofo konkretiĝis en la Universala Deklaracio de la Homaj Rajtoj. Al tiu ĉi deklaro ankaŭ ekz. Universala Esperanto-Asocio (UEA) en sia Statuto esence rilatas. Oni do bonracie povas diri, ke la interna ideo ĉiam estis kaj estas integra parto de la Esperanta movado kaj de ties oficialaj organizaĵoj.

3. Ekde la estiĝo de Esperanto en la tempoj de Zamenhofo la mondo profunde ŝanĝiĝis. En nia jarcento-jarmilo la mortiga dilemo inter la detruo de la biosfero, kaj la kreado de mondvasta justeco, kondukis kadre de UN kaj de la civilsocio al la estigo-enkonduko de la koncepto de daŭropoveco kaj de la gvidmodelo de daŭropova evoluigo. Per ĝi oni celas superregione, regione kaj loke, kaj por la nuna kaj postaj generacioj, apliki praktikajn rimedojn por realigi la principojn de la Homaj Rajtoj, aparte koncerne superregionajn problemojn pri mankanta justeco (kaj ties teruraj sekvoj) **ĉe samtempa konservado de la biosfero**. La koncepto de daŭropova evoluigo servas al la akordiĝemo inter universala justeco kaj biosfera integreco, neniu el ambaŭ povas ekzisti sen la alia.

4. Esperanto estas neŭtrala lingvo, sed ne tiom neŭtrala, ke ĝi identiĝas ekstere de la Homaj Rajtoj. En la Statuto de UEA tekstas sub A.5: "Bonaj internaciaj rilatoj kaj la respekto de la homaj rajtoj, tiaj, kiaj ili estas difinitaj en la Universala Deklaracio de la Homaj Rajtoj kaj aliaj internacie rekonataj instrumentoj, estas por la laboro de UEA esencaj kondiĉoj". En la nova situacio de la homaro la daŭropoveco kiel universalaĵo kvazaŭ plivastigas la pure interhomajn sferojn de libereco, egaleco, frateco kaj paco en tiun inter la homo, ties tutmonda socio kaj la biosfero, de kiu la homo ja estas plene dependa parto kaj partnero. Estas interfaco de ekologio kaj la homa identeco. Ĝi troviĝas inter la ajnideologie socie organizita naturo de la homo kaj la memorganiza naturo kiel tia. Nur sukcesa integrado de ambaŭ signifas vivopovan naturon kaj vivindan futuron. Per sia imanenta ekologia identeco Esperanto (ankaŭ forme de la oficiala movado kaj organizado) fine konkretiĝas kiel tio, kio ĝi dekomence estis: ekologie daŭropova komunikilo. Per la nocio-koncepto "daŭropoveco" la interna ideo ja tre racie sin prezentas laŭ moderna aldonajo, tute laŭvoje de sia primara ideo-praktika universalismo.

5. Kontraste al ĉiu etna lingvo, **Esperanto estas ekologie daŭropova komunikado** pro tio, ke ĝi el si mem estas preventiva. Pli detale tio ĉi signifas:

1-e. Rilate al la problemoj de la monda **justecokrizo**, t.e. koncerne **kvaliton**, la aplikado de Esperanto sur interkultura, interetna kaj internacia niveloj maksimume reduktas porsociajn riskojn per aktiva realigado de justiga "demokratia dulingveco". Per tio malhelpatas la marginigo aŭ eĉ la formortado de minoritataj lingvoj-kulturoj, certe ties diskriminaciado.

2-e. Rilate al la problemoj de la **mediokrizo**, forme de endanĝerigo de la biosfero, t.e. koncerne **kvanton**, la aplikado de Esperanto sur regiona kaj superregiona niveloj maksimume reduktas pormediajn riskojn per aktiva realigado de la principoj pri maldispado kaj ŝparemo koncerne materialajn resursojn. (Esperanto reduktas la nombron de la tradukvojoj de $n(n-1)$ al "n", se "n" estas la nombro de la lingvoj, en EU nuntempe de 506 al 23. Aldone la impostŝarĝo de la averaĝa civitano de la EU por lerni Esperanton reduktiĝas al malpli ol 5 % de tiu necesa por lerni 3 fremdlingvojn, kiel kelkfoje estas postulata de EU).

Kompreneble Esperanto, forme de siaj individuoj kaj kolektivoj, efikas negative sur la medion. Ĉi-cele ekz. pripensendas la "ideologio de esperantisma mond-privojaĝado". Por mildigi-nuligi la neeviteblajn kontraŭekologiajn efikojn per la agado de la "oficiala esperantismo" oni bone povus establi kompenso-mechanismojn, ekz. partoprenadon en reforestigaj projektoj.

6. Komunikado estas parto de la tutmondigo. Esperanto kiel lingvo organizata ne restas ekster la ekologia pritaksado. Imanente ĝi ja estas ekologia fenomeno. La **praktiko** devas tion atesti. Ĉiuokaze estus groteskaĵo, se homa eltrovaĵo tiom imanente ekologia kiel Esperanto aplikatus ekster la striktaj postuloj de la nova paradigmo de daŭropoveco kaj partoprenadas en la detruo de socio kaj biosfero. Estas tasko de la ĉi-rilataj elitoj en la Esperanta movado zorgi pri adekvata novorientiĝo kaj partoprenigi la propran projekton en la novan kaj indan perspektivon al la futuro.

7. Resume do konstatablas, ke la imanenta ekologia memidenteco de Esperanto estas taŭga ekzemplo de aplikebla daŭropoveco en la kampo de internacia komunikado, koncerne de la justeco kaj la mediokrizo. La racie kaj logike ampleksigita interna ideo metas nian pro-

jekton de neŭtrala internacia lingvo en la unuan linion de futurinda tutmondiĝo.

La mondo ĝis nun riproĉinde neglektis la utiligon de Esperanto en interkomunikado, la soci-ekologiaj sekvoj estas kalkuleblaj. Sed ĉefe gravas konsekvenca ekologia memidentigo de la Esperanto-movado kaj de ties oficialaj organizaĵoj-instancoj.

Pro tio jen fine tiuĉirilata propono por verdire plej esenca kaj absolute necesa preamblo por la “Manifesto de Prago de la Movado por la Internacia Lingvo Esperanto“:

Biosfero kaj Justeco

La homa specio estas parto kaj partnero en la tuto de la viva kaj malviva materioj. La homfaritaj medio- kaj justecokrizoj koncernas ankaŭ la komunikadon-interkompreniĝadon interindividuan kaj intersocian. En la tutaĵigita mondo la memorganizado-memkonservado de la pensa viva materio direkte al kaj avantaĝe por si mem devas fariĝi kolektiva kaj komunikada inteligento por la vivo entute. Esperanto estas neetna helplingvo kaj kiel unu lingvo por ĉiuj imanente neŭtrala, justa kaj materiale maldisipa. Ni asertas, ke la tutmonda komunikado devas okazi laŭ la principoj de dekomenca daŭropova evoluigo, t.e. de nedifektado kontraŭ la biosfero kaj de atingado de tutmonde interhoma justeco. Ni estas movado de unurange daŭropova komunikado-interkompreniĝado.

Literaturo

Abromeit T. (2004). Sprache, Amerikanisierung, Globalisierung und Demokratie, www.Tristan-Abromeit.de; www.vds-ev.de

Aleus (1999). Europa so - oder besser: Eurologie und Sprachpolitik, 1; Paderborn, ISBN 3-929853-10-8

Attali J. (1999). Fraternités, Une nouvelle utopie; Fayard, Paris.

Brand K.W. (2000). Kommunikation über nachhaltige Entwicklung, oder: Warum sich das Leitbild der Nachhaltigkeit so schlecht vermitteln lässt; sowi-online e.v., Bielefeld.

Brocchi D. (2007). The Cultural Dimension of Sustainability, Institut Cultura21 e.V.

Rede zur Eröffnung der Woche der *Brüderlichkeit* 2004. Rathaus Augsburg; www2.augsburg.de/fileadmin/www/dat/10ak/reden/2004/040314.pdf

Brüderlichkeit. <http://de.wikipedia.org/wiki/Brüderlichkeit>

Bürger M. (1998). Esperanto - positive oder negative Utopie im babylonischen Europa?; TRANS 1998

EU - Europäische Kommission (2006). Weissbuch über eine europäische kommunikationspolitik, Fragen und Antworten; 2006 <http://www.adatrad.com/blog/uebersetzung-von-eu-dokumenten>; 2007

EU, Generaldirektion Übersetzung (DGT), Fragen und Antworten zur DGT; http://ec.europa.eu/dgs/translation/navigation/faq/faq_facts_de.htm

Frieden - (globale Gerechtigkeit) – Nachhaltigkeit; <http://www.philosophers-today.com/whats-going-on/krieg-frieden.html>

Globalisierung (2008). Bundeszentrale für politische Bildung (BRD).

Globalisierung (2008). Ursachen, Fakten, Folgen: www.globalisierung-infos.de

Gollner M. (2005). Eigentum versus Menschenrechte; Paulo Freire Zentrum.

Gore A. (2006). An Inconvenient Truth, Rodale, ISBN-13:978-1-59486-567-1

Gruber U. (2008). Über die Erfindung der Nachhaltigkeit. Scheidewege, S. Hirzel, ISBN 978-3-7776-1637-7

Gruhl H. (1989). Planet Erde - Die Plünderung geht weiter; Jahrbuch 1989; Faumes-Verlag, Basel

Guenther W. Ecologia comunicación, El esperanto - Parte de la protección racional del futuro, exopto@gmail.com (Kaleidoscopio)

Guenther W. (1998). La internacia lingvo (esperanto, ILo) kiel preventilo de la noosfero; *Magazino 23* (3/1998)

Guenther W. (1994). Preventivo - ĉu ekologia kvintesenca de la vivo-mondo? (ĉe la aŭtoro)

Hamadeh A.: Was ist Frieden; Das Palestina Portal; <http://www.arendt-art.de>

Hamaker J.D. & D.A. Weaver (1982). The Survival of Civilization; Hamaker-Weaver Publishers; ISBN 0-941550-00-1

Hanisch C. (2002). Menschenrechte im Kulturvergleich; Uni Wien

Haszpra O. (2006). Egaleco kaj alta efikeco en la internacia komunikado; *Literatura Foiro 223*, ISSN 0393-2907

Homaranismo de D-ro L.L. Zamenhof; <http://homarano.narod.ru/Windows/homaro-e.htm>

Kagan S. & V. Kirchberg (ed.) (2008). Sustainability: a new frontier for the arts & cultures; VAS, ISBN 978-3-88864-440-5

Krainer L. & R. Trattnig (2007). Kulturelle Nachhaltigkeit, oekom München; ISBN 978-3-86581-080-9

- Kuhlen R.* (2004). Wissensökologie; www.inf-wiss.unikonstanz.de/People/RK/Publikation2004/a08-Kuhlen-AA.pdf
- Künzli A.* (2006). De Hilelismo al Homaranismo ĉe L.L. Zamenhof; www.plansprachen.ch/files/HOMARANISMO_PRELEGO_2005-6.pdf
- Leist A.* (2005). Ökologische Ethik II: Ökologische Gerechtigkeit: Global, intergenerationell und humanökologisch; in: J. Nida-Rümelin, *Angewandte Ethik. Die Bereichsethiken und ihre theoretische Fundierung*, Stuttgart.
- Deutscher Esperanto-Bund* (1994). Leitbild
- Lins U.* (1988). *La danĝera lingvo*; Bleicher; ISBN 3-88350-505-6
- Sing M.* (1998). *Lokale Anwendung Agenda 21 und Frieden*; Netzwerk Friedenskooperative, *Friedensforum* 1/1998
- Lokale Agenda 21* (1999). *Aspekte einer nachhaltigen entwicklung*, LpB Baden-Württemberg; *Politik und Unterricht* 4/1999
- Luttere W.* (2000). *Gregory Bateson - Auf den Spuren ökologischen Bewusstseins*, Norderstedt: LibriBoD 2000
- Mallia C.* (2000). *De la interna ideo al homaranismo*. <http://homarano.narod.ru/Windows/ideo-e.htm>
- Matthias U.* (2004). *Esperanto - Eine Chance für Europa*; www.u-matthias.de/chance/chance.htm
- Menschenrechte*: <http://gajwien.at/GAJ-Menschenrechte.htm>
- Moya G.* (1987). *La homa vivaventuro*, Barcelona Esperanto-Centro 1987; ISBN 84-398-8887-2
- Odum E.P.* (1983). *Grundlagen der Ökologie*; Thieme; ISBN 3-13-382402-3
- Ökologie*; <http://de.wikipedia.org/wiki/%C3%96kologie>
- Phillipson R.* (2004). *Ĉu nur-angla Eŭropo?* UEA: ISBN 92 9017 0840
- Privat E.* (1977). *Vivo de Zamenhof*; The Esperanto Publishing Company, Orelia, Australia; ISBN 0-85230-201-0
- Rössler-Buckel R. & F.-G. Rössler* (2006). *Esperanto - la lingvo de paco, Interkultura Komunikado ekde 1887 ĝis hodiaŭ*; Speyer 2006
- Sachs W.*: *Ökologie- die neue Farbe der Gerechtigkeit*; http://www1.uni-hamburg.de/Globale_Zukunft/ausarbeitungen/sachs.htm
- Sachs W.* (2004). *Ohne Ökologie keine transnationale Gerechtigkeit*; *Polis* 1/2004
- Sachs W.* (2003). *Ökologie und Menschenrechte, Welche Globalisierung ist zukunftsfähig?*; *Wuppertal Papers* Nr.131 2003 ISSN 0949-5266
- Selten R.* (1997). *La kostoj de la Eŭropalingva (Ne-)Komunikado; "esperanto" rADIKALA asocio, 1997*

- Semashko L.M.* (2003). *Tetrasociologio*, Eldonejo SPbSHTU; ISBN 5-7422-0445-x
- Sikosek Z.M.* (2003). *Esperanto sen mitoj*; Flandra Esperanto-Ligo, Antwerpen; ISBN 90-71205-703
- Spaemann R.* (2002). *Grenzen - Zur ethischen Dimension des Handelns*; Klett-Cotta Stuttgart; ISBN 3-608-91027-1
- Sperry R.* (1985). *Naturwissenschaft und Wertentscheidung*; Piper; ISBN 3-492-02937-x
- Sprachrechte* (1996). *Déclaration Universelle des Droits Linguistiques*; Barcelona.
- Spurensicherung* (1993). *Die Deklaration über Umwelt und Entwicklung*; *Jahrbuch Ökologie*; Hirzel.
- Stone C.D.* (1987). *Earth and other Ethics*; Harper & Row; ISBN 0-06-091486-6
- treffpunkt umweltethik*; *Nachhaltige Entwicklung - Definition und Regeln*; <http://www.treffpunkt-umweltethik.de/leitbilder/nachhaltige-entwicklung.htm>
- UEA* (1996). *Manifesto de Prago*.
- UEA* (1980). *Statuto de UEA: Jarlibro 1980*
- Umweltbundesamt (BRD)* (2006). *Umweltbewusstsein und nachhaltiger Konsum, Ökologische Gerechtigkeit*.
- UN* (2000). *United Nations Millenium Declaration 55.2*;
- UN*: *Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj*; <http://www.unchr.ch/udhr/lang/1115.htm>
- Wagenleitner R.* (2003). *Was heisst Globalisierung?*; Aurora.
- Wenke M.* (2005). *Einführung in die Umweltökonomie (Ökonomie, Ökologie und Ethik)*; Hochschule Niederrhein.

Adreso de la aŭtoro

Dr. Wolfgang GUENTHER
 AP 270 – C/Esperanto 3
 ES – 03170 *Rojales (Alicante)*
 HISPANIO
 <w.guenther.esperanto@web.de>

Priaŭtoro informo

Anestezisto, ekologo, artisto, esperantisto. Kunfondinto de Asocio de Verdaj Esperantistoj (AVE). Kiel kuracisto, advokato de konsekvenca preventiv-medicino.